

Anton Čeňov

*Sveda alumeto*



## SVEDA ALUMETO (KRIMINALA RAKONTO)

### I

Matene, la 6an de oktobro 1885, en la kancelarion de la **kampara polickomisaro** de la dua subdistrikto de la distrikto S. venis bone vestita junulo kaj deklaris, ke estas murdita lia mastro, eksa gvardia korneto Marko Ivanoviĉ Klauzov. Deklarante, la junulo estis pala kaj tre emociita. Liaj manoj tremis kaj la okuloj plenis je teruro.

— Kun kiu mi havas la honoron paroli? — demandis lin la komisaro.

— Psekov, administranto de Klauzov; agronomo kaj meĥanikisto.

La komisaro kaj **atestantoj**, venintaj kun Psekov al la loko de la krimo, ekvidis jenan bildon. Apud la korta dometo, en kiu loĝis Klauzov, svarmis homamaso. Informo pri la okazintaĵo disvastiĝis fulm-rapide, kaj pro la feria tago loĝantoj de ĉiuj najbaraj vilaĝoj amasiĝis ĉe la dometo. Regis rumoro. Kelkaj vizaĝoj estis palaj kaj larmozaj. La dormoĉambra pordo estis ŝlosita. La ŝlosilo estis enŝovita elinterne.

— Evidente, la fiuloj venis al li tra la fenestro, — diris Psekov esplorante la pordon.

La serĉantoj eniris en la ĝardenon, kien direktiĝas la dormeja fenestro. La fenestro estis morna kaj sinistra. Ĝi estis ŝirmita de preskaŭ senkoloriĝinta verda kurteno. Unu el la anguloj de la kurteno estis iom kurbiĝinta, kaj tio ebligis rigardi en la ĉambron.

— Ĉu iu el vi rigardis tra la fenestro? — demandis la komisaro.

— Tute ne, via komisara moŝto, — diris ĝardenisto Jefrem, malalta grizhara maljunulo kun la tipa vizaĝo de ekŝiĝinta suboficiro, — kiel eblas rigardi, se la tuta korpo tremas pro timo?

— Aĥ, Marko Ivanoviĉ, Marko Ivanoviĉ! — ĝemis la komisaro rigardante al la fenestro. — Ja mi ofte diris al vi, ke malbone vi

finos! Mi diris al vi, kompatindulo — sed vi ne atentis miajn vortojn! Malĉasto ne kondukas al bono!

— Dankon al Jefrem, — diris Psekov, — sen li ni certe ne divenus. Li la unua komprenis, ke io ne estas en ordo. Li venis al mi hodiaŭ matene kaj diris: “Kial nia sinjoro tiel longe ne vekigās? Jam la tutan semajnon li ne forlasas sian ĉambron”. Apenaŭ li tion diris, mi tuj ŝokiĝis kvazaŭ klabita... Tuj la penso fulmis... Li ne aperis ekde la pasinta sabato, sed hodiaŭ jam estas dimanĉo! Sep tagoj pasis — la afero tute ne estas ŝerca!

— Jes, kompatinda... — ree ĝemis la komisaro. — Li estis saĝa, klera kaj tre bonkora. Ĉetable, eblas diri, li ĉiam estis la plej elstara figuro. Sed malĉastulo, bone li vivu en la ĉielo. Mi de li ĉion atendis! Stefano, — la komisaro diris al unu el la atestantoj, — tuj veturu al mia hejmo kaj urĝu Andreĉjon al la **distrikta poliestro** por raporti. Diru, ke Marko Ivanoviĉ estas murdita! Ankaŭ al la serĝento venu, kial li dolĉe ripozas? Li veturu ĉi tien. Sed vi mem veturu al la enketestro Nikolao Jermolajeviĉ kaj diru al li, ke li venu ĉi tien. Atendu, tuj mi skribos al li leteron.

La komisaro postenigis gardistojn ĉirkaŭ la domo, skribis leteron al la enketestro kaj iris al la administranto trinki teon. Post deko da minutoj li sidis sur tabureto, singarde mordetis sukeron kaj glutis brogantanojn.

— Jen, sinjoro... — li diris al Psekov, — Jen... Nobelo. Riĉa homo... **Ŝatato de dioj, eblas diri same kiel Puŝkin**, sed kio rezultis? Nenio! Li drinkis, malĉastis, kaj... jen sinjoro!... estas mortigita.

Post du horoj alveturis la enketestro Nikolao Jermolajeviĉ Ĉubikov — alta, fortika maljunulo, ĉirkaŭ sesdekjara, jam dum kvarona jarcento laboranta en sia fako. La tuta distrikto konas lin viro honesta, saĝa, vigla kaj ŝatanta sian profesion. Al la krimloko kun li venis lia ĉiama akompananto, asistanto kaj sekretario Djukovskij, alta junulo, ĉirkaŭ dudeksekjara.

— Ĉu vere, sinjoroj? — ekparolis Ĉubikov enirante al la ĉambro de Psekov kaj rapide salutante la ĉeestantojn per manpremoj. — Ĉu vere? Marko Ivanoviĉ? Murdita? Ne... Tio estas nebla! Ne-eb-la!

— Sed ja tiel... — suspiris la kampara komisaro.

— Dio mia! Ja mi pasintvendrede en la foiro en Tarabanjkovo

vidis lin! Mi kun li, pardonu min, trinkis vodkon.

— Sed ja tiel... -- denove suspiris la komisaro.

Ĉiuj kelkfoje ĝemis, teruriĝis, trinkis po glaso da teo kaj iris al la dometo.

— Liberigu la vojon! — la serĝento kriis al la amaso.

Enirinte en la dometon, la enketestro unue ekzamenis la dormoĉambran pordon. La pordo estis pina, flava kaj nedifektita. Specialaj indikoj, kiuj povus iel helpi la enketon, ne estis trovitaj. Oni komencis rompmalfermi la pordon.

— Sinjoroj, mi petas vin foriri! — diris la enketestro al la publiko, kiam post longa frapado kaj krakado la pordo cedis al hakilo kaj ĉizilo. — Mi petas por sukceso de la enketo. Serĝento, enlasu neniun!

Ĉubikov, lia asistanto kaj la komisaro malfermis la pordon kaj hezite, unu post alia, venis en la ĉambron. Al iliaj okuloj prezentiĝis jeno. Apud la sola fenestro staris granda ligna lito kun grandega lanuga matraco. Sur la ĉifita matraco kuŝis ĉifita kaj buligita lankovrilo. La kapkuseno en indiana tegosako, same forte ĉifita, kuŝacis surplanke. Sur la apudlita tableto troviĝis arĝenta poŝhorloĝo kaj arĝenta dudekkopeka monero. Apud ili kuŝis sulfuraj alumetoj. Krom la lito, tableto kaj unusola seĝo en la ĉambro estis neniuj mebloj. Sub la lito la komisaro ekvidis dudekon da malplenaj boteloj, malnovan pajlan ĉapelon kaj kvaronsitelan botelegon da vodko. Sub la tableto kuŝis polvokovrita boto. Rapide pririgardinte la ĉambron, la enketestro malseveniĝis kaj lia vizaĝo ruĝiĝis.

— Kanajloj! — li murmuris pugnigante la manojn.

— Sed kie estas Marko Ivanoviĉ? — mallaŭte demandis Djukovskij.

— Mi petas vin ne interveni! — bruskis al li Ĉubikov. — Bonvolu esplori la plankon! Tio okazas al mi jam la duan fojon, Jevgraf Kuzmiĉ, — li diris al la komisaro, mallaŭtigante la voĉon.— En la 1870a jaro mi enketis tian kazon. Ja vi, verŝajne, memoras... La murdo de la komercisto Portretov. Tiam estis same. La kanajloj murdis lin kaj elportis la kadavron tra fenestro...

Ĉubikov venis al la fenestro, tiris flanken la kurteneton kaj neforte puŝis la fenestron. Ĝi malfermiĝis.

— Ĝi malfermiĝis, do ne estis riglita... Hm! Spuroj sur la

fenestrobreto. Ĉu vi vidas? Jen spuro de genuo... Iu rampis de tie... Necesas tre zorge pririgardi la fenestron.

— Surplanke estas nenio speciala, — diris Djukovskij, — nek makuloj, nek skrapoj. Mi trovis nur uzitan svedan alumeton. Jen! Laŭ mia memoro Marko Ivanoviĉ ne fumis; ĉebezono li uzis sulfuraĵn alumetojn, sed ne la svedajn. La alumeto eble estos konviktaĵo...

— Aĥ... bonvolu ĉesi! — la enketestro svingis sian manon. — Ne trudiĝu kun via alumeto. Mi ne toleras tro ardajn personojn. Anstataŭ serĉi alumetojn, prefere esploru la liton!

Esplorinte la liton, Djukovskij raportis:

— Estas nek sangaj, nek aliaj makuloj... Freŝaj ŝiroj same mankas. Sur la kuseno estas dentospuroj. La kovrilo estas priverŝita de likvaĵo kun laodoro kaj gusto de biero... La ĝenerala aspekto de la lito rajtigas nin pensi, ke sur ĝi okazis batalo.

— Sen vi mi scias pri la batalo! Ne pri batalo mi vin demandas. Anstataŭ serĉi batalon, prefere...

— Unu boto estas ĉi tie, la alia mankas.

— Kaj do?

— Oni lin strangolis, kiam li estis demetanta la botojn. Li ne sukcesis demeti la duan boton, kiam oni...

— Halanĝo!.. Kial vi pensas, ke li estis strangolita?

— Sur la kuseno estas spuroj de dentoj. La kuseno mem estas forte ĉifita kaj ĵetita for de la lito je du kaj duona arŝinoj.

— Jen rezono sen bezono! Ni prefere iru en la ĝardenon. Vi prefere la ĝardenon pririgardu anstataŭ ĉi tie fosi... Tion mi faros sen via helpo.

Veninte en la ĝardenon ili tuj ekokupiĝis pri la herbo. Sub la fenestro ĝi estis premita. Ankaŭ lapo, kreskanta subfenestre ĉe la muro, estis malordigita. Djukovskij sukcesis trovi en ĝi kelkajn rompitaĵn branĉetojn kaj vatopecon. Sur la supraj kapituloj estis trovitaj maldikaj dense bluj lanfadenoj.

— Kiun koloron havis lia lasta kostumo? — Djukovskij demandis al Psekov.

— Ĝi estis flava, veltola.

— Bonege. Do, ili havis bluan veston.

Kelkaj lapaj kapituloj estis detranĉitaj kaj envolvitaj en

paperon. Tiumomente venis la estro de la distrikta polico, Arcibaŝev-Svistakovskij, kaj la kuracisto Tjutjujev. La poliestro tuj post la salutoj komencis kontentigi sian scivolon, sed la doktoro, alta kaj tre malgrasa viro kun la kavaj okuloj, longa nazo kaj akra mentono, neniun salutinte kaj pri nenio demandinte, sidiĝis sur arbostumpo, ĝemis kaj diris:

— **La serboj denove tumultas.** Mi ne komprenas, kion ili bezonas. Ho, Aŭstrujo, Aŭstrujo. Ja estas viaj fiaj agoj!

La elekstera esplorado de la fenestro donis absolute nenion, sed la esplorado de la apudaj arbustoj kaj herboj donis multajn utilajn faktojn. Ekzemple, Djukovskij trovis sur la herbo longan malhelan strion konsistantan el makuloj, kiu etendiĝis kelkajn klaftojn de la fenestro en la profundon de la ĝardeno. La strio finiĝis sub unu el la siringaj arbustoj per granda malhelbruna makulo. Sub la sama arbusto troviĝis boto, kiu estis para al la boto trovita en la domo.

— Malnova sango! — diris Djukovskij rigardante la makulojn.

La doktoro, aŭdinte la vorton “sango”, leviĝis kaj ĵetis flegman rigardon al la makuloj.

— Jes, sango, — li balbutis.

— Do, li ne estis strangolita, ĉar estas sango! — diris Ĉubikov, sarkasme rigardante al Djukovskij.

— Oni strangolis lin en la ĉambro, kaj ĉi tie, timante ke li reviviĝos, oni batis lin per io akra. La makulo montras, ke li kuŝis tie sufiĉe longe, dum ili serĉis manieron porti lin el la ĝardeno.

— Sed la boto?

— La boto plifirmigas mian ideon, ke oni mortigis lin, kiam li enlitiĝonte demetis la botojn. Unu boton li demetis, sed la duan — ĉi tiun — li sukcesis demeti nur duone. La duondemetita boto dumvoje deglitiĝis pro skuoj kaj falo.

— Inteligenteco, vidu! — ridetis Ĉubikov. — Tuj li ĉion komprenas kaj prezentas. Kiam vi ĉesos interveni kun via rezonado? Anstataŭ rezonadi, prefere prenu iom da sangomakulita herbo por analizado!

Post la esplorado estis desegnita plano de la loko, kaj la enketantoj iris al la administranto skribi protokolon kaj matenmanĝi. Ĉe la tablo komenciĝis interparolo.

— La horloĝo, mono kaj cetero... ĉio restis surloke, — Ĉubikov



komencis la konversacion. — Klaras, kiel duoble du kvaras, ke la murdintoj ne celis lin priŝteli.

— Murdis persono klera kaj edukita, — intervenis Djukovskij.

— El kio vi konkludas?

— Mi havas la svedan alumeton, kaj ilin ankoraŭ ne uzas la kampuloj ĉi tie. Tiajn alumetojn uzas nur bienuloj, sed eĉ ne ĉiu el ili. Cetere, murdis ne unu, sed almenaŭ tri personoj: du tenis lin kaj la tria strangolis. Klauzov estis forta, kaj la murdintoj devis scii tion.

— Kiel li povus uzi sian forton, se li, supozeble, dormis?

— La murdistoj aperis, dum li demetis la botojn. Li demetis la botojn — do, ne dormis.

— Ĉesu elpensi. Prefere manĝu!

— Sed laŭ mia opinio, via moŝto, — diris la ĝardenisto Jefrem surtabligante samovaron, — tiun ĉi fiaĵon faris neniu alia ol Nikolaŝka.

— Tute eble, — diris Psekov.

— Kio estas tiu Nikolaŝka?

— La ĉambristo de l' sinjoro, via moŝto, — respondis Jefrem. — Kiu, se ne li? Bandito li estas, via moŝto! Tia drinkulo kaj malĉastulo, ke gardu nin de li la Ĉiela Reĝino. Al la mastro vodkon ĉiam li portis, la mastron ĉiam li enlitigis. Kiu do mortigis, se ne li? Kaj li ankoraŭ, mi kuraĝas diri al via moŝto, foje fanfaronis, kanajlo, en drinkejo, ke li mortigos la mastron! Ĉio okazis pro Akuljka, pro la ino. Li havis tiun soldatedzinon... Sed al la sinjoro ŝi ekplaĉis, li do ŝin al si prenis, nu kaj tiu... kompreneble, koleriĝis... En la kuirejo li nun kuŝaĉas ebria. Ploreĝas... Mensogas, ke li kompatas la mastron...

— Ja vere, pro Akuljka eblas koleriĝi, — diris Psekov. — Ŝi estas soldata edzino, virino simpla, sed... Ne vane Marko Ivanoviĉ nomis ŝin **Nana**. Estas en ŝi io simila al Nana... io loga.

— Mi vidis... Scias... — diris la enketestro brue purigante sian nazon per ruĝa naztuko.

Djukovskij ruĝiĝis kaj ekrigardis suben. La komisaro ektamburis sian fingron sur la subtasoj. La poliestro tuis kaj ial komencis serĉi ion en la teko. Ŝajne nur la doktoron tute ne impresis la mencio pri Akuljka kaj Nana. La enketestro ordonis venigi Nikolaŝkan. Nikolaŝka, alta junulo kun longa cikatroza nazo kaj kava brusto, en malnova mastra jako, eniris en la ĉambron de Psekov kaj ĝispede

riverencis al la enketestro. Lia dormema vizaĝo havis larmospurojn. Li estis ebria kaj apenaŭ tenis sin sur la kruroj.

— Kie estas la sinjoro? — demandis lin Ĉubikov.

— Murdita, via moŝto.

Dirinte tion Nikolaŝka komencis palpebrumi kaj esploris.

— Mi scias, ke murdita. Sed kie li estas nun? Kie estas la korpo?

— Oni diras, ke ili lin elfenestrigis kaj enterigis en la ĝardeno.

— Hm!.. La rezulton de la enketo scias eĉ la servistoj... Aĉe. Karulo, kie vi estis la nokton, kiam estis murdita la sinjoro, do — sabate?

Nikolaŝka ekrigardis supren, longigis la kolon kaj enpenŝigis.

— Mi ne povas scii, via moŝto, — li diris. — Mi estis ebria kaj nenion memoras.

— Alibio! — flustris Djukovskij, rikanante kaj kunfrotante la manojn.

— Bone. Sed kial sub la fenestro estas sango?

Nikolaŝka ekrigardis supren kaj enpenŝigis.

— Pli rapide pensu! — la poliestro diris.

— Tuj. La sangon bagatelo kaŭzis, via moŝto. Mi buĉis kokinon. Mi ĝin buĉis tutsimple, kiel kutime, sed ĝi subite elsaltis el miaj manoj kaj ekkuregis... Jen pro tio la sango aperis.

Jefrem depoziciis, ke Nikolaŝka efektive buĉas ĉiuvespere kokinojn en diversaj lokoj, sed ĝis nun neniu vidis fuŝbuĉitan kokinon kuri en la ĝardeno, kion, tamen oni ne povas tute malkonfirmi.

— Alibio, — diris Djukovskij kun rikano. — Kia stulta alibio.

— Ĉu vi havis rilatojn kun Akuljka?

— Jes, mi pekis.

— Ĉu poste la mastro ŝin delogis?

— Ne. Estis sinjoro Ivano Miĥajloviĉ Psekov, kiu kaptis de mi Akuljkan, kaj de Ivano Miĥajloviĉ la sinjoro ŝin forkaptis. Jene okazis.

Psekov konfuziĝis kaj komencis froti sian maldekstran okulon. Djukovskij trapikis lin per siaj okuloj, komprenis la perpleksiĝon kaj tremeris. Sur la administranto li ekvidis bluan pantalonon, kiun li pli frue ne atentis. La pantalono memorigis al li la bluajn fadenojn trovitajn sur la lapo. Ankaŭ Ĉubikov, siavice, ekzamenis Psekovon per suspekta rigardo.

— Foriru! — li diris al Nikolaŝka. — Nun permesu demandi vin,



sinjoro Psekov. Vi certe estis ĉi tie la sabatan vesperon, ĉu ne?

— Jes, je la deka mi vespermanĝis kun Marko Ivanoviĉ.

— Kaj poste?

Psekov konfuziĝis kaj ekstaris.

— Poste... poste... Vere, mi ne memoras, — li balbutis. — Mi multe trinkis tiam... Mi ne memoras, kie kaj kiam mi ekdormis... Kial vi ĉiuj rigardas min tiel, kvazaŭ mi mortigus?

— Kie vi vekigiĝis?

— En la kuirejo, [sur la forno](#)... Ĉiuj povas konfirmi tion. Sed mi ne scias, kiel mi trafis sur la fornon.

— Ne maltrankviliĝu... Ĉu vi estis konata kun Akuljka?

— Tio tute ne estas eksterordinara.

— Ĉu de vi ŝi iris al Klauzov?

— Jes... Jefrem, donu pli da fungoj! Ĉu vi deziras teon, Jevgraf Kuzjmiĉ?

Komenciĝis peza kaj terura silento, kiu daŭris ĉirkaŭ kvin minutojn. Djukovskij silentis sen forpreni siajn pikajn okulojn de la paliĝinta vizaĝo de Psekov. La silenton rompis la enketestro.

— Necesas, — li diris, — viziti la grandan biendomon kaj interparoli tie kun la fratino de la murdito, Maria Ivanovna. Eble ŝi donos al ni iujn informojn.

Ĉubikov kaj lia helpanto dankis pro la matenmanĝo kaj iris al la granda domo. La fratino de Klauzov, kvardekkvinjara fraŭlinon Maria Ivanovna, ili ekvidis preĝi antaŭ la alta familia [ikonoŝranko](#). Rimarkinte en la manoj de la gastoj tekojn kaj policajn kaskedojn ŝi paliĝis.

— Unue, mi petas vian pardonon pro la rompo de via, por tiel diri, preĝa humoro, — la galanta Ĉubikov komencis riverencante kaj brue ŝovis la piedojn sur la planko. — Ni venis al vi kun demando. Vi certe jam aŭdis... Oni supozas, ke via frato estas, iel-tiel, murdita. Dia volo, vi ja scias... La morton evitas nek servistoj, nek ministroj. Ĉu vi povas helpi nin per informo aŭ klarigo?..

— Aĥ, ne demandu min! — diris Maria Ivanovna, iĝante eĉ pli pala kaj ŝirmante la vizaĝon per la manoj. — Mi nenion povas diri al vi. Nenion! Mi vin petegas! Mi nenion... Kion mi povas? Aĥ, ne, ne... neniun vorton pri la frato! Eĉ mortonte mi silentos pri li!

Maria Ivanovna ekploris kaj iris en alian ĉambbron. La enketistoj rigardis unu la alian, embarasite levis la ŝultrojn kaj retiriĝis.

— Diabla ino! — sakris Djukovskij forlasante la domon. — Evidente, ŝi ion scias, sed kaŝas. Ankaŭ la vizaĝo de la ĉambristino estas suspektinda. Atendu, diablinoj! Ni ĉion ekscios!

Vespere Ĉubikov kaj lia asistanto, lumigataj de la blankvizaĝa luno, estis revenantaj hejmen. Ili sidis en karioleto resumante la rezulton de la taga laboro. Ambaŭ lace silentis. Ĉubikov ne ŝatis paroli dumvoje, kaj la parolema Djukovskij silentis komplezante la maljunulon. Sed fine de la vojaĝo la helpenketestro, ne plu povante silenti, ekparolis:

— Ke Nikolaŝka komplicas en la afero, — li diris, — **non dubitandum est**. Jam lia muzelo klare montras, kia ulo li estas. La alibio perfidas lin de la kapo ĝis la piedoj. Same sendubas, ke ne li iniciatis la aferon. Li estas nur stulta, dungita instrumento. Ĉu vi konsentas? Ne lastan rolon en la kazo ludas ankaŭ la modesta Psekov. Blua pantalone, konfuziĝo, surforna kuŝado pro timo post la murdo, alibio kaj Akuljka.

— Babilu frato dum via monato. Laŭ vi: murdis tiu, kiu konis Akuljkan, ĉu? Ho, vi, arda kapo! Suĉilon vi devas suĉi, sed ne enketi! Ankaŭ vi Akuljkan amindumis — ĉu do ankaŭ vi partoprenas en la afero?

— Ankaŭ ĉe vi Akuljka unu monaton loĝis kiel kuiristino, sed... mi nenion diras. En la krim-nokto ni kune kartludis, mi vidis vin, aliokaze mi ankaŭ al vi kroĉiĝus. Temas, karulo, ne pri la ino. Temas pri abomena, kovarda kaj fia sento... Vidu, al la modesta junulo ne plaĉis, ke ne li venkis. Memamo, vidu. Venĝon li ekdeziris. Kaj plu. La dikaj lipoj klare parolas pri voluptemo. Ĉu vi memoras, kiel li ŝmacetis per la lipoj komparante Akuljkan kaj Nanan? Li, fripono, brulas pro pasio. Sendube. Do, ofendita memamo kaj nekontentigita pasio. Tio sufiĉas por murdi. La duopo jam estas en niaj manoj, sed kiu estas la tria? Nikolaŝka kaj Psekov tenis, sed kiu strangolis? Psekov estas timida kaj konfuziĝema — vera poltrono. Tiaj, kia Nikolaŝka, ne scias strangoli per kuseno: ili agas krude, per hakilnuko... Strangolis iu alia, sed kiu?

Djukovskij surtiris la ĉapelon ĝisokule kaj enpeniĝis. Li silentis

ĝis kiam la kariolo venis al la domo de la enketestro.

— **Eŭreka!** — li diris enirante en la domon kaj demetante la mantelon — Eŭreka, Nikolao Jermolajeviĉ. Mi ne scias, kial mi ne divenis pli frue. Ĉu vi scias, kiu estis la tria?

— Bonvolu lasi min. Jen, la vespermanĝo pretas! Sidiĝu kaj manĝu!

La enketestro kaj Djukovskij sidiĝis al la tablo. Djukovskij verŝis al si glaseton da vodko, ekstaris, rektiĝis kaj diris, brilante per la okuloj:

— Do sciu, ke la tria, kiu agis kun la fripono Psekov kaj strangolis, estis virino. Jes, sinjoro! Mi parolas pri la fratino de la murdito, Maria Ivanovna!

Ĉubikov misglutis vodkon kaj gapis al Djukovskij.

— Ĉu vi... freneza? Ĉu la kapo vin ne tiel? Ĉu ne doloras?

— Mi sanas. Nu, eĉ se mi estas freneza, kiel vi klarigas ŝian konfuziĝon ĉe nia veno? Kiel vi klarigas ŝian nedeziron respondi? Estu ĝi bagatelo — bone! Ne konsideru! Sed rememoru pri iliaj rilatoj. Ŝi malamegis sian fraton. Ŝi estas **malnovritanino**, sed li estas diboĉulo kaj blasfemulo. Jen kie nestas la malamo! Onidire, li sukcesis konvinki ŝin, ke li estas sendito de Satano. En ŝia ĉeesto li praktikis spiritismon.

— Kaj do?

— Ĉu vi ne komprenas? Ŝi, malnovritanino, murdis lin pro fanatikeco. Ja ŝi ne nur elsarkis la misherbbon-malpiulon, ŝi liberigis la mondon de Antikristo — kaj tio, ŝi pensas, estas ŝia merito, ŝia religia heroaĵo. Ho, vi ne konas tiajn maljunajn malnovritajn fraŭlinojn! Legu Dostojevskij! Kaj kion skribas **Leskov**, **Peĉorskij**?.. Ŝi, certe ŝi, tranĉu min, sed mi ne reprenos miajn vortojn. Ŝi strangolis! Ho, ruzega ino! Ja ŝi staris antaŭ la ikonoj, kiam ni venis, nur ĉar ŝi volis nin misgvidi, ĉu ne? Mi staros kaj preĝos, kaj ili pensos, ke mi estas trankvila kaj ne atendas ilin. Jen la metodo de ĉiuj komencantaj krimuloj. Kara Nikolao Jermolajeviĉ! Kara mia! Fordonu al mi la enketon! Permesu al mi persone ĝin fini! Mi ĝin komencis — mi ĝin finos.

Ĉubikov malaprobe skuis la kapon kaj severigis la vizaĝon.

— Mi mem scias esplori komplikajn kazojn, — li diris. — Kaj vi ne devas ŝovi la nazon en fremdan vazon. Via afero estas skribi, kiam

mi diktas al vi!

Djukovskij ruĝiĝis, klakfermis la pordon kaj foriris.

— Saĝulo, damne! — balbutis Ĉubikov rigardante al la pordo.

— Graaanda saĝulo! Sed tro arda! Necesos al li en foiro cigarujon aĉeti...

Sekvamatene al la enketestro estis venigita el Klauzovka grandkapa, leporlipa junulo, kiu, nominte sin paŝtisto Danilo, faris interesan depozicion.

— Havis mi iom da vaporo en la kapo. Ĝis la noktomezo ĉe la baptulino gastis. Ire hejmen mi, malsobra, ekvolis en la rivero baniĝi. Naĝadas mi... kaj jen! Iras sur la digo du kaj nigraĵon portas. “Tju!” — kriis mi al ili. Ili timiĝis kaj forleporis al la legomĝardenoj de Makarjev. Draŝu min Dio, se ili ne la sinjoron portis.

Samtage antaŭ la vesperiĝo Psekov kaj Nikolaŝka estis arestitaj kaj eskortitaj en la distriktan ĉefurbon, kie ili estis lokitaj en la prizono.

## II

Dek du tagoj pasis.

Estis mateno. Enketestro Nikolao Jermolajeviĉ sidis ĉe verda tablo en sia kabineto kaj foliumis la dokumentojn de la afero “Klauzov”. Djukovskij malkviete, kiel lupro en kaĝo, paŝadis de angulo al angulo.

— Vi kredas la kulpon de Nikolaŝka kaj Psekov, — li parolis senpacience pinĉante sian junan barbon. — Sed kial vi ne volas konvinkiĝi pri la kulpo de Maria Ivanovna? Ĉu la pruvoj ne sufiĉas, ha?

— Mi ne diras, ke mi ne estas konvinkita. Mi estas, sed ial mi ne kredas... Fidindaj pruvoj mankas, estas nur filozofio... Fanatikeco, kaj tiel plu...

— Kaj vi nepre bezonas hakilon, sangozajn litotukojn... Juristoj! Sed mi pruvos al vi! Vi ĉesos tiel senzorge rilati al la psiĥologia aspekto de la kazo. [Via Maria Ivanovna estos en Siberio](#). Mi pruvos. Al vi ne sufiĉas la filozofio, mi havas ion pli materialan... Ĝi montros al vi, ke pravas mia filozofio. Nur permesu al mi iom veturi en la distrikto.

— Pri kio temas?

— Pri la sveda alumeto, sinjoro... Ĉu vi forgesis? Sed mi ne forgesis. Mi ekscios, kiu bruligis ĝin en la ĉambro de la murdito! Ĝin bruligis nek Nikolaŝka, nek Psekov, kiuj dum la traserĉo ne havis alumetojn, sed la tria, do, Maria Ivanovna. Kaj mi pruvos!.. Nur permesu al mi traveturi la distrikton kaj ekscii ĉion...

— Jam sufiĉas, sidiĝu... Ni faru pridemandadon.

Djukovskij sidiĝis ĉe tableto kaj enigis sian longan nazon en paperojn.

— Venigu Nikolaon Teteĥov! — kriis la enketestro.

Oni venigis Nikolaŝkan. Nikolaŝka estis pala kaj malgrasa kiel splito. Li tremis.

— Teteĥov! — komencis Ĉubikov. — En la 1879a jaro vi estis juĝita ĉe la juĝisto de la unua subdistrikto kaj estis enprizonigita. En la 1882a jaro vi denove estis juĝita pro ŝtelo kaj duafoje trafis en prizanon... Ni ĉion scias...

La vizaĝo de Nikolaŝka esprimis miregon. La ĉioscio de la enketestro tre mirigis lin. Sed baldaŭ la miro ŝanĝiĝis je ekstrema malĝojo. Li ekploregis kaj petis permeson lavi sin kaj trankviliĝi. Oni forkondukis lin.

— Venigu Psekovon! — ordonis la enketestro.

Estis venigita Psekov. La mieno de la junulo dum la lastaj tagoj tre ŝanĝiĝis. Li maldikiĝis, paliĝis kaj malvigliĝis. En liaj okuloj videblis apatio.

— Sidiĝu, Psekov, — diris Ĉubikov. — Mi esperas, ke ĉi-foje vi estos prudenta kaj ne plu mensogos. En la pasintaj tagoj vi ĉiam malagnoskis vian partoprenon en la murdo de Klauzov, malgraŭ la amaso de pruvoj, atestantaj kontraŭ vi. Tio estas malprudenta. Konfeso mildigas la punon. Hodiaŭ mi interparolas kun vi lastafoje. Se vi hodiaŭ ne konfesos, morgaŭ estos jam malfrue. Nu, rakontu al ni...

— Mi scias nenion... Ankaŭ viajn pruvojn mi ne scias, — li flustris.

— Vane, sinjoro! Permesu do al mi rakonti, kiel tio okazis. La sabatan vesperon en la dormejo de Klauzov vi trinkis kun li vodkaĵon kaj bieron. (Djukovskij ponardis sian rigardon en la vizaĝon de Psekov sen forpreni ĝin dum la tuta monologo de Ĉubikov.) Vin servis Nikolao. Post la dek-dua horo Marko Ivanoviĉ deklaris al vi sian

deziron enlitiĝi. Li ĉiam kuŝiĝis tiutempe. Kiam li estis demetanta la botojn kaj donanta al vi ordonojn pri la mastrumado, vi kun Nikolao post konvencia signo kaptis la ebrian mastron kaj ĵetis lin sur la liton. Unu el vi sidiĝis sur liajn kruojn, la alia sur la kapon. Tiumomente el la vestiblo eniris nigraroba virino, konata al vi, ŝi anticipa interkonsentis kun vi pri partopreno en tiu krima afero. Ŝi prenis la kusenon kaj komencis strangoli lin. Dum la luktado la kandelo estingiĝis. La virino elpoŝigis skatolon da svedaj alumetoj kaj rebruligis la kandelon, ĉu ne? Mi en via vizaĝo legas, ke mi diras la veron. Sed plu... Strangolinte lin kaj certiĝinte, ke li ne plu spiras, vi kun Nikolao eltrenis lin tra la fenestro kaj metis apud la laparo. Timante lian reviviĝon, vi batis lin per io akra. Poste vi plu portis lin kaj kuŝigis lin por kelka tempo sub siringo. Ripozinte kaj iom pensinte, vi denove portis lin... Portis super la barilon. Poste ekiris sur la vojo... Poste sur la digo. Apud ĝi vin timigis iu kamparano. Sed kio al vi okazis?

Psekov, pala kiel blanka tolo, ekstaris kaj ŝanceliĝis.

— Tro sufoke por mi! — li diris. — Bone... estu tiel... Nur permesu al mi eliri... Bonvole.

Oni forkondukis lin.

— Finfine li konfesis! — Ĉubikov plezure etendis la korpon. — Li perfidis sin. Sed kiel lerte mi agis! Fakte superŝutis...

— Ankaŭ la virinon en nigro li ne kontestas! — ekridis Djukovskij. — Tamen min terure turmentas la sveda alumeto! Mi ne plu povas toleri. Ĝis! Mi veturos.

Djukovskij surmetis sian kaskedon kaj forveturis. Ĉubikov komencis pridemandi Akuljkan. Akuljka deklaris, ke ŝi scias tute nenion...

— Mi vivis nur kun vi, kun neniu alia, — ŝi diris.

Je la sepa vespere revenis Djukovskij. Li estis enorme emociita. Liaj manoj tremis tiel forte, ke li ne povis malbutoni la palton. Liaj vangoj flamis. Estis videble, ke li revenis kun novaĵo.

— **Veni, vidi, vici!** — li diris enflugante en la ĉambron de Ĉubikov kaj falante sur fotelon. — Mi ĵuras per mia honoro, ke mi komencas kredi mian genion. Aŭskultu min, diablo vin prenu ĉiom! Aŭskultu kaj miru, mia oĉjo! Ridinde kaj triste! En viaj manoj jam estas triopo... ĉu ne? Mi trovis la kvaran krimulon, pli ĝuste, krimulinon, ĉar



ankaŭ tiu estas virino! Kaj kia virino! Nur pro unu tuŝo al ŝiaj ŝultroj mi oferus dek jarojn da vivo! Sed aŭskultu... Mi venis al Klauzovka kaj komencis spirali ĉirkaŭ ĝi. Dumvoje mi vizitis ĉiujn butikojn, drinkejojn kaj gastejojn, ĉie petante svedajn alumetojn. Ĉie oni respondis al mi “ne”. Mi rondiris ĝis nun. Dudekfoje mi perdis la esperon kaj dudekfoje rericevis ĝin. Mi vagaĉis la tutan tagon kaj nur antaŭ unu horo trovis la serĉaton. Je tri verstoj de ĉi tie. Oni donis al mi dekskatolan kesteton. Unu skatoleteto mankis. Mi tuj: “Kiu ĝin aĉetis?” — “Sinjorino ... Ekplaĉis al ŝi kiel ili ŝuŝas”. Anĝelo mia! Nikolao Jermolajeviĉ! Kiajn miraklojn povas fari homo forpelita el seminario kaj leginta verkojn de **Gaboriau** — oni ne povas imagi! Ekde hodiaŭ mi estimas min!.. Ufff... Nu, ni veturu!

— Sed kien?

— Al ŝi, al la kvara... Necesas hasti, alie... mi forbrulos pro la senpacienco. Ĉu vi scias, kiu ŝi estas? Vi ne divenos! La juna edzino de nia maljuna kampara polickomisaro, Jevgraf Kuzjmiĉ. Olga Petrovna — jen kiu! Ŝi aĉetis la alumetskatolon!

— Ĉu vi... ci... vi... frenezigiĝis?

— Tre kompreneble! Unue, ŝi fumas. Due, ŝi supermezure enamiĝis al Klauzov. Sed li ignoris ŝian amon pro iu Akuljka. Venĝon! Nun mi rememoras, ke mi foje vidis ilin en la kuirejo post ekranego. Ŝi amĵuris al li, kaj li fumis ŝian cigaredon eligante la fumon en ŝian vizaĝon. Tamen ni veturu... jam krepuskiĝas... Ni veturu!

— Mi ankoraŭ ne estas tiel freneza, ke pro iu bubaĉo mi nokte malkvietigu la noblan, honestan virinon.

— Nobla, honesta... Ĉifono vi estas pro tio, sed ne enketestro. Mi neniam kuraĝis insulti vin, sed nun vi devigas min! Ĉifono! Nokta surtuto! Nu, karulo, Nikolao Jermolajeviĉ! Mi petas vin!

La enketestro svingis sian brakon kaj kraĉis.

— Mi petas vin! Mi petas ne por mi, sed je la intereso de l’ justico! Mi petegas! Komplezu min almenaŭ unu fojon en la vivo.

Djukovskij surgenuiĝis.

— Nikolao Jermolajeviĉ! Nu, estu bona! Nomu min kanajlo, fiulo, se mi ne pravos pri tiu virino. Sed kia kazo! Brila kazo! Romano, sed ne kazo! Tra la tuta Ruslando iros la famo. Oni promocios vin enketestro pri speciale gravaj kazoj! Komprenu, senprudenta

maljunulo!

La enketestro malsereniĝis kaj nevolonte etendis la manon al sia ĉapelo.

— Nu, diablo vin prenu! — li diris. — Ni veturu.

Jam estis mallume, kiam la kariolo de la enketestro venis al la komisara domo.

— Kiaj porkoj ni estas! — diris Ĉubikov prenante la sonorilon. — Ni maltrankviligas homojn.

— Ne gravas... ne timu... Ni diros, ke nia risortaro rompiĝis.

Ĉe la sojlo Ĉubikov kaj Djukovskij estis akceptitaj de alta, graseta virino, ĉirkaŭ dudektrijara, kun brovoj nigraj kiel gudro kaj kun grasaj ruĝaj lipoj. Ŝi estis Olga Petrovna.

— Aĥ... Tre agrable! — ŝi diris ridetante per la tuta vizaĝo. — Vi sukcesis ĝuste al la vespermanĝo. Mia Jevgraf Kuzmiĉ forestas. Ĉe la popo li gastas. Sed ni ĉion bone aranĝos sen li... Sidiĝu! Ĉu vi revenas de enketado?..

— Jes, ĉe nia kariolo, vi sciu, risortaro difektiĝis, — komencis Ĉubikov, enirante en la gastoĉambron kaj sidiĝis sur fotelon.

— Vi tuj... ŝoku ŝin! — flustris Djukovskij. — Ŝoku ŝin!

— Risorto... hm... jes... Ni, do, venis.

— Ŝoku, mi diras al vi. Ja ŝi divenos, se vi plu maĉados la vortojn.

— Nu, faru tiel, kiel vi volas, sed min liberigu! — balbutis Ĉubikov, ekstarante kaj irante al la fenestro. — Mi ne povas! Vi la kaĉon ekkuiris, vi ĝin manĝu!

— Jes, risorto... — komencis Djukovskij alirante la komisaredzinon kaj sulkante sian longan nazon. — Ni venis nek por vespermanĝi, nek al Jevgraf Kuzmiĉ. Ni venis por demandi vin, kara sinjorino, kie estas Marko Ivanoviĉ, kiun vi mortigis?

— Kio? Kia Marko Ivanoviĉ? — ekbalbutis la komisaredzino kaj ŝia granda vizaĝo subite tuj puncigis. — Mi... ne komprenas.

— Mi demandas je la nomo de l' justico. Kie estas Klauzov? Ni ĉion scias!

— Kiu diris? — ŝi mallaŭte demandis, ne elportante lian rigardon.

— Bonvolu montri al ni, kie li estas?

— Sed kiel vi eksciis? Kiu rakontis al vi?

— Ni ĉion scias, sinjorino! Mi postulas je la nomo de l' justico.

La enketestro, kuraĝigita de ŝia konsterniĝo, venis al ŝi kaj diris:

— Montru al ni, kaj ni foriros. Alie ni...

— Por kio vi bezonas lin?

— Kial vi demandas, sinjorino? Ni petas vin montri. Vi estas konfuzita, vi tremas... Jes, li estas murdita kaj, se vi volas aŭdi la veron, murdita de vi! La komplicoj denunciis vin!

La komisaredzino paliĝis.

— Iru, — ŝi mallaŭte diris, tordante al si la brakojn. — Mi lin kaŝis en la bandometo. Sed, je Dio, nenion diru al la edzo! Mi petegas! Li ne elportos tion.

Ŝi prenis de la muro grandan ŝlosilon kaj ekgvidis la gastojn tra la kuirejo kaj vestibletoj al la korto. En la korto estis mallume. Pluvetis. Ŝi ekiris antaŭen. Ĉubikov kaj Djukovskij paŝis post ŝi tra altaj herboj, spirante odorojn de sovaĝa kanabo kaj lavakvo subpiede ŝmacanta. La korto estis granda. La koto baldaŭ finiĝis, kaj la piedoj eksentis plugitan teron. En la mallumo aperis siluetoj de arboj, kaj inter la arboj — dometo kun oblikva fumtubo.

— Bandometo, — ŝi diris. — Sed mi petegas vin: rakontu al neni!

Veninte al la bandometo Ĉubikov kaj Djukovskij ekvidis sur la pordo grandegan pendseruron.

— Preparu kandelon kaj alumetojn! — la enketestro flustris al sia asistanto.

La komisaredzino malŝlosis la seruron kaj enlasis la gastojn en la dometon. Djukovskij bruligis alumeton kaj lumigis la antaŭĉambron. Meze de ĝi staris tablo. Sur la tablo apud negranda globforma samovaro staris supujo kun malvarma brasiksupo kaj telero kun restaĵo de iu saŭco.

— Plu!

Ili eniris en la bandometon mem. Ankaŭ tie staris tablo, sur kiu estis granda plado kun porkfemuro, botelego da vodko, teleroj, tranĉiloj, forkoj.

— Sed kie estas... tiu? Kie la murdito? — demandis la enketestro.

— Sur la supra breto! — murmuris la pala kaj tremanta komisaredzino.

Djukovskij prenis la kandelon kaj grimpis sur la supran breton.

Tie li ekvidis longan homan korpon, kiu senmove kuŝis sur granda lanuga matraco. La korpo mallaŭte ronkis...

— Oni nin mistifikas, diablo prenu! — kriis Djukovskij. — Estas ne li. Ĉi tie kuŝas iu vivanta idioto. Hej, kiu vi estas, diablo vin prenu!

La korpo kun fajfo enspiris aeron kaj ekmoviĝis. Djukovskij kubutis ĝin. Ĝi levis la brakojn, etendiĝis kaj duonlevis la kapon.

— Kiu grimpas ĉi tien? — raŭke demandis peza baso. — Kion ci bezonas?

Djukovskij movis la kandelon al la vizaĝo de la nekonato kaj ekkriis. Laŭ la skarлата nazo, laŭ la taŭzitaĵoj, laŭ la gudre nigra paro de lipharaj faskoj, unu el kiuj brave direktiĝis al la plafono, li rekonis la kavalerian subleŭtenanton Klauzov.

— Ĉu vi... Marko... Ivanoviĉ?! Ne povas esti!

La enketestro rigardis supren kaj stuporiĝis...

— Estas mi, jes... Ha, Djukovskij! Kiu diablo sendis vin ĉi tien? Kaj kies muzelo estas malsupre? Patro ĉiela! La enketestro! Kial la sorto pelis vin ĉi tien?

Klauzov haste saltis malsupren kaj brakumis Ĉubikovon. Olga Petrovna tuj forkuris tra la pordo.

— Pro kio vi venis ĉi tien? Damne, ni trinku! Tra-ta-ti-to-tom! Ni trinku! Sed kiu vin venigis? Kiel vi eksciis, ke mi estas ĉi tie? Cetere, tio ne gravas! Ni trinku!

Klauzov funkciigis lampon kaj verŝis tri glasetojn da vodko.

— Sed mi ne komprenas vin, — diris la enketestro disetendante la brakojn. — Ĉu estas vi aŭ ne vi?

— Jam sufiĉas. Ĉu vi volas admoni min? Ne valoras la penon! Junulo Djukovskij, malplenigu vian glaseton! **Ni pasigu, amiko-o-oj, la...** — li ekkantis. — Kial vi spektas? Trinku!

— Tamen, mi ne povas kompreni, — diris la enketestro maŝine trinkinte vodkon. — Kial vi estas ĉi tie?

— Kial mi ne estu ĉi tie, se mi ĉi tie bone fartas? — Klauzov trinkis kaj akompanis la vodkon per ŝinko. — Mi loĝas ĉe la komisar-edzino, kiel vi vidas. En densej', en ĝangalo, kvazaŭ koboldo. Trinku. Mi kompatis, frato mia, ŝin. Kompatis, kaj do ermitas nun en la forgesita bandometo... Nutriĝas. Sekvasemajne mi forpafos min de ĉi tie... Tio jam tedis min.

— Nekoncepteble! — diris Djukovskij.  
— Kio do en tio estas nekonceptebla?  
— Nekoncepteble! Diru, je Dio, kiel via boto trafis en la ĝardenon?  
— Kia boto?  
— Unu boton ni trovis en la dormejo kaj la duan en la ĝardeno.  
— Sed por kio vi sciuj tion? Ne via afero! Sed trinku, diablo vin prenu! Vi min vekis, do trinku! Interesa aventuro, frato mia, okazis al tiu boto. Mi ne volis iri al Olga. La humoro ne taŭgis, vi komprenas, mi havis iom da vaporo en la kapo. Ŝi venis al la fenestro kaj ekinsultis. Vi ja scias, kiel inoj... entute... Mi, ebrie, ĵetis al ŝi la boton... Haha... Jen, ne insultu. Ŝi enrampis tra la fenestro, bruligis la lampon kaj komencis draŝi min, ebrian. Tradraŝinte, ŝi altrenis min ĉi tien kaj enŝlosis. Nutriĝas mi nun... Amo, vodko kaj zakusko. Sed kien vi, Ĉubikov? Kien vi foriras?

La enketestro kraĉis kaj eliris. Lin sekvis Djukovskij, klininte la kapon. Ili silente sidigis en la kariolon kaj forveturis. Neniam la vojo ŝajnis al ili tiel enua kaj longa kiel ĉi-foje. Ambaŭ silentis. Ĉubikov la tutan vojon tremis pro la indigno. Djukovskij kaŝis sian vizaĝon post la kolumo, kvazaŭ timante, ke la mallumo kaj pluveto tralegos la honton sur lia vizaĝo.

Reveninte hejmen la enketestro trovis ĉe si doktoron Tjutjujev. La doktoro sidis ĉe la tablo kaj, peze suspirante, foliumis la revuon *Niva*.

— Jen kio okazas en la mondo! — li diris salutante per trista rideto la enketestron. — Aŭstrujo denove ekas! Ankaŭ *Gladstone* iel...

Ĉubikov ĵetis sian ĉapelon sur la tablon kaj skuigis:

— Damna skeleto! Ne alkroĉigu! Milfoje mi diris al vi, ke vi ne tedu min kun via politiko! Nun la politiko ne interesas min! Kaj al vi, — Ĉubikov turnigis al Djukovskij, svingante sian pugnon, — al vi... eterne mi tion memoros!

— Sed... ja la sveda alumeto! Ĉu mi povus scii?

— Forglutu vian alumeton kaj sufokiĝu! Foriru kaj ne iritu min, alie mi el vi faros diablo-scias-kion! Ne plu metu viajn piedojn en mian hejmon.

Djukovskij ĝemis, prenis la ĉapelon kaj foriris.

— Mi iru trinki! — li decidis, elirinte post la pordegon kaj triste treniĝis al drinkejo.

La komisaredzino, reveninte hejmen el la bandometo, trovis la edzon en la gastoĉambro.

— Por kio la enketestro nin vizitis?

— Por diri, ke Klauzov estas trovita. Imagu, oni trovis lin ĉe fremda edzino!

— Ho, Marko Ivanoviĉ, Marko Ivanoviĉ! — suspiris la komisaro, levante la rigardon. — Mi ja diris al vi, ke malĉasto ne kondukas al bono! Mi diris al vi... sed vi ne atentis!

Tradukis el la rusa **Aleksander Korĵenkov**



## NOTOJ

*Sveda alumeto* (Шведская спичка) estis verkita en aŭgusto 1883 kaj aperis en la jar-almanako de *Strekoza* (1884), poste en *Buntaj rakontoj* (1886). La Esperanta traduko de Aleksander Korĵenkov aperis felietone en *Literatura Foiro* (1984, №87, 88; 1985, №89, 90), poste en la Ĉeĥovaj antologioj *Sveda alumeto* (Sverdlovsk: Sezonoj, 1991, p. 9–30) kaj *Ĉeriza ĝardeno* (Kaliningrado: Sezonoj, 2004, p. 17–34). En ĉi tiu eldono estas uzita la teksto, aperinta en la *Ĉeriza ĝardeno* kun kelkaj etaj korektoj.

**kampara polickomisaro** (R становой пристав). Estro de la sub-distrikta polico.

**atestantoj**. La leĝo postulas, ke dum polica priserĉado ĉeestu nepolicaj atestantoj.

**distrikta policestro**. (R исправник). Estro de la distrikta polico.

**Ŝatato de dioj, eblas diri same kiel Puŝkin**. Citaĵo el *La kanto pri saĝa Olego* (1822) de Aleksandr Puŝkin. Kurioze, en la Esperanta traduko de Sergej Rublov (Puŝkin A. [*Elektitaj verkoj*]. Jaroslavlĵ, 2002) ĉi tiuj vortoj mankas: “Respondu, sorĉisto, sen iu sekret”.

**La serboj denove tumultas!** Post la ruslanda-turka milito (1877–1878) Serbio ricevis sendependecon de Turkio, sed la reganto de Serbio, princo Milan, en 1881 per kontrakto subigis Serbion al Aŭstrio-Hungario. Reage al tiu kontrakto en oktobro 1883 en Serbio komenciĝis ribelo.

**Nana**. Protagonistino de la samtitola romano (1880) de Émile Zola, bone pagata amoristino. Ĉeĥov plurfoje menciis ŝin en siaj verkoj.

**...sur la forno...** La granda rusa forno havas supre kuŝejon.

**ikonoŝranko** (R кивот, киот; Greke: κιβωτός). Ŝranketo kun vitra(j) pordeto(j) aŭ surmura vitrita framo por ikonoj.

**non dubitandum est.** Estas sendube (*lat.*).

**Eŭreka (Greke: εὕρηκα).** Ĉi tiu vorto (= mi trovis), kiun laŭ legendo Arĥimedo kriis trovinte la ĉefan regulon de hidrostato, nun estas uzata por esprimi ĝojon pri plenumo de komplika tasko aŭ apero de bona ideo.

**malnovritano (R старовер).** Rusortodokso ne akceptinta la reformojn, kiujn patriarko Nikono (1605–1681) iniciatis meze de la 17a jarcento.

**Leskov, Nikolaj Semjonoviĉ (1831–1895).** Rusa verkisto, aŭtoro de pluraj verkoj pri la rusaj vivo kaj ideologio; li kritikis la modernajn morojn kaj defendis la tradiciojn en la vivmaniero kaj en la rusortodoksa religio.

**Peĉorskij, Andrej.** Pseŭdonimo de rusa verkisto Pavel Ivanoviĉ Melnikov (1818–1883), aŭtoro de kvarvoluma epopeo pri la vivo de postvolgaj malnovritanoj *En la arbaroj* (1871–1874) kaj *Sur la montoj* (1875–1881).

**Via Maria Ivanovna estos en Siberio.** Pluraj ruslandaj prizonoj kaj bagnejoj tiutempe estis en Siberio. Pri Siberiaj bagnejoj legu en la Esperanta traduko (de Viktor Sapoĥnikov) de *Resurekto* de Lev Tolstoj (Jekaterinburg: Sezonoj, 2000).

**Veni, vidi, vici!** Mi venis, ekvidis, venkis! (*lat.*). Ĉi tiu esprimo, atribuita de Plutarĥo al Julio Cezaro, estas en la rusa lingvo uzata por karakterizi (ofte, kun ironia nuanco) sukcesan plenumon de grava tasko.

**Gaboriau, Èmile (1832–1873).** Franca verkisto, aŭtoro de krimromanoj.

**Ni pasigu, amiko-o-oj, la...** Fragmento el la refreno de populara studenta kanto *Tro mallongas la viv'.*

**Niva.** Grenkampo (*ruse*). Ĉiusemajna populara ilustrita revuo por amasa legantaro (Peterburgo, 1870–1918).

**Gladstone, William Ewart (1809–1898).** Brita politikisto, gvidanto de la Liberala Partio, kvarfoja ĉefministro de Granda Britio (1868–1874, 1880–1885, 1886, 1892–1894). En 1882 lia registaro iniciatis invadon en Egiptio. En la priskribata tempo li tenis firman pozicion en konflikto kun Ruslando pri la problemo de la afganaj limoj.

## Pri ĉi tiu libro

La papera eldono:

**Anton Ĉeĥov. *Ĉeriza ĝardeno.***

Rakontoj noveloj kaj dramoj.

Kompilis Aleksander Korĵenkov.

Kaliningrado: Sezonoj, 2004.

Serio Rusa literaturo; Volumo 10.

*Sveda alumeto*

La teksto: paĝoj 15–34.

La notoj: paĝoj 337–339.

Ĉiuj rajtoj rezervitaj por la traduko estas ĉe la tradukinto.

© Aleksander Korĵenkov, 2004, 2010.

La elektronika eldono:

Anton Ĉeĥov. *Sveda alumeto.*

Kaliningrado: Sezonoj, 2010.

*Virtuala Biblioteko*; №2.

Sur la kovrilpaĝo estas uzita portreto de Anton Ĉeĥov,  
pentrita de Osip (Iosif) Braz en 1898.

Ĉi tiu senpaga eldonado estas nur por privata legado,  
ne por pludistribuo.

Oni ne rajtas sen permeso de la tradukinto (Aleksander Korĵenkov)  
publikigi ĉi tiun tekston plene aŭ fragmente  
en iu ajn papera kaj elektronika formo.

Kontakt-adreso:

[sezonoj@yahoo.com](mailto:sezonoj@yahoo.com)

## **Virtuala Biblioteko de *Sezonoj***

№1. Aleksandr Puŝkin. *La pika damo*.  
Kaliningrad: *Sezonoj*, 2010. 30 paĝoj.  
(Tradukis Aleksander Korĵenkov)

№2. Anton Ĉeĥov. *Sveda alumeto*.  
Kaliningrad: *Sezonoj*, 2010. 24 paĝoj.  
(Tradukis Aleksander Korĵenkov)